

BE

ISSN 0006-9477



104-a jaro
N-ro 341
Junio 2012



KIU LI ESTAS?

Kovrilo

Sur la kovrilo troviĝas foto de AKAC, el Belo Horizonte, kiam li estis 27-jara. Temas pri eminenta tradukisto kaj vortaristo, elstara figuro de la brazila Esperanto-movado.

- 03** Ĉefartikolo
- 04** Poemo: Mathias Joaquim de Gama e Silva
- 05** Omaĝo: Maria das Dores Góes
- 06** Artikolo: Osmar da Silva Alves
- 10** Omaĝo
- 12** Novaĵo: Evandro de Freitas
- 14** Intervjuo: José Saraiva Matos
- 15** Literaturo: Julio Lopes de Almeida
- 17** Kroniko: BEL-Estraro
- 18** Forpasoj



Foto de AKAC.

Eldiro

“Por ni, esperantistoj, Zamenhof estas la aŭtoro de nia lingvo. Ni forgesas, ke por li mem Esperanto estis nur parto de pli grava ideo: la revo pri la unuiĝo de la homaro.”

ALEKSANDER KORĴENKOV naskiĝis la 23-an de majo 1958 en Ruslando, redaktoro de la revuo “La Ondo de Esperanto”, inĝeniero, verkisto.

Revukunlaboraĵoj: La ĉefredaktoro rigardas gravajn la kunlaboraĵojn senditajn de la legantoj. Tamen, pro hommanko, spaclimigoj en la revuo, kaj kromaj limigoj, li rezervas al si la rajtojn: **1-e:** Ne sciiĝi la ricevon; **2-e:** Ne redoni la sendaĵojn; **3-e:** Ne garantii publikigon; **4-e:** Mallongigi tekston tiam, kiam necese; **5-e:** Ĝin reviziigi laŭ ortografia, gramatika kaj terminologia aspektoj. Kiel gramatikan konsultfonton ni rekomendas la verkon “Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko”, de Bertilo Wennergren. La signifon de ĉiuj vortoj netroveblaj en “Plena Ilustrita Vortaro de Esperanto” (2005) oni aparte klarigu per glosaro.

Anonctarifo: Tabelo pri prezoj (Brazila Esperantisto) Onoj de paĝo (anoncoj)

● Komercaj markoj reproduktitaj celas nur ilustrati kaj apartenas al la posedantoj

tutpaĝa (19x25cm)
4-a kovrilo R\$ 900,00 (kolora)
2-a kaj 3-a kovriloj R\$ 600,00 (nigra-blankaj)

1/2 duonpaĝa (9x24cm)
R\$ 450,00 (kolora)
R\$ 300,00 (nigra-blanka)

1/3 trionpaĝa horizontale
(8x18cm) R\$ 300,00 (kolora)
R\$ 200,00 (nigra-blanka)

1/3 trionpaĝa vertikale
(8x18cm) R\$ 300,00 (kolora)
R\$ 200,00 (nigra-blanka)

1/6 sesonpaĝa (7.8x8.8cm)
R\$ 150,00 (kolora)
R\$ 100,00 (nigra-blanka)

UNUECO ESTAS FORTO

Jen alia numero de Brazila Esperantisto. La estraro de BEL klopodas aperigi la revuon kvarfoje jare. Ĝis nun la estraro sukcesis plenumi tiun taskon, malgraŭ la financaj malfacilaĵoj. Oni konsideras BE kiel la heroldon de nia brazila movado. La Redakcio kaj la estraranoj de BEL esperas, ke BE estos atente legata kaj observata de multaj esperantistoj.

En ĉi tiu numero ni intervjuas nian karan samideanon José Saraiva Matos, veterano kaj laborema esperantista el Salvador, Bahia, al kiu la brazila esperantistaro multon ŝuldas. Ni ankaŭ omaĝas la samideaninon Maria das Dores Góes, prezidantino de Brasília Esperanto-Asocio kaj de Federacia Konsilantaro, eminenta virino, kiu antaŭ pluraj jaroj laboras senĉese por Esperanto. Ni informas ankaŭ pri la forpaso de Wilson Veadado, el Belo Horizonte, Minas Gerais, kompetenta, klera kaj elstara esperantisto. Alia eminentulo meritas nian atenton. Temas pri Allan Kardec Afonso Costa, tradukisto, instruisto kaj vortaristo, kiu loĝas en la ĉarma urbo Belo Horizonte.


Ni profitas la okazon por klarigi, ke la januaron 2013, en Barra do Garças, okaze de la 48-a Brazila Kongreso de Esperanto, membroj de BEL elektos novan estraron. Atentu bone: la nunaj estraranoj ne intencas ofici plu, kaj esperas, ke sindediĉaj kaj kompetentaj esperantistoj kandidatiĝos.

BE publikigas ankaŭ raporton pri la pasinta financa jaro de BEL, aprobata de la Kontrola Komitato.

Plezure ni informas, ke Brazila Esperanto-Ligo eldonis la verkon "Neforgeseblaj skribaĵoj de Ismael Gomes Braga", enhavante artikolojn, recenzojn kaj leterojn de nia kara majstro. Tia libro estas legebla, leginda kaj legenda. Aĉetu ĝin!

Ne forgesu, kara leganto: unueco estas forto. En nia afero ĉiu laboranto estas grava. Ĉiu membro devas kontribui al la laboro de nia movado. Ĉu vi jam pagis la BEL-kotizon? Ni esperas, ke ĉiu membro tuj pagu sian kotizon por 2012, ĉiu nemembra leganto tuj aliĝu al BEL, por ke la venonta jaro donu rikolton eĉ pli riĉan al nia movado.



Brazila Esperanto-Ligo 

Brazila Esperantisto

ISSN 0006-9477

Oficiala Organo de Brazila Esperanto-Ligo

Fondita en 1907 de Alberto A. Vieira, Reynaldo Geyer kaj Everardo Backheuser
104-a jaro - Junio 2011 - N-ro 337

Eldona Stabo

Respondeca ĵurnalisto: Viviane Castro

Ĉefredaktisto: Eurípedes Alves Barbosa

Ĉi-numeraj kunlaborantoj: Benedicto Silva, Francisco Stefano Wechsler, Paulo Sérgio Vianna

Grafika aranĝo kaj enpaĝigo: Viviane Castro

Revizio kaj tradukado: Eldona Komisiono

Presejo: Gráfica Sergipe (Brasília/DF)

Kontribuajojn kaj mesaĝojn sendu al la retadreso de la ĉefredaktisto: euripedes-barbosa@ig.com.br

Pri la subskribitaj artikoloj respondecas la aŭtoroj mem

Fondita en 1907

Sidejo SDS - Bloco P,36 - salas 301/303 - Ed. Venâncio III CEP 70393-902 - Brasília/DF

Telefono (0xx61) 3226 1298 Faksno (0xx61) 3226 4446

Retadreso bel@esperanto.org.br Hejmpaĝo www.esperanto.org.br

Estraro

Prezidanto S-ro Lício de Almeida Castro Vic-prezidanto S-ro Eurípedes Alves Barbosa
1-a Sekretario S-ino Sufia Alves de Lima 2-a Sekretario S-ro Carlos Alfredo Aragón Guerreiro
3-a Sekretario S-ro Devanizio Apolinário dos Santos
Financa Direktoro vaka. Kasisto S-ro Darci Gomes Sardinha

Kontrola Konsilantaro

Aymoré Vaz Pinto, José Carlos Dorini Ramos, Adolpho de Miranda Silva, Lia Milhomem Moreno,
Cleto Galvão da Silva, Evandro Ferreira de Avellar

Federacia Konsilantaro

Prezidanto S-ino Maria das Dores Góes

Komitatano-A Paulo Nascentes

Ĉefdelegito de UEA James Rezende Piton

SONETO

Mathias Joaquim de Gama e Silva
(Al Sinjorino Eulalia Salles)

Vi petas al mil soneton;
Bedaŭrinde mi ne povas
Fari, ĉar vortojn ne trovas
Por pentri vian portreton.

Mi volus scii sekreton
Kiu koron de floroj movas,
Kiam nokte vento blovas
Parfurmante la monteton.

Tiam mi havus kuraĝon
Por formi je la koloroj
De via vivo pejzaĝon,

Kaj mi pentrus je odoroj
Vian ĉielan vizaĝon
Pli belan ol belaj floroj.

Gojasujo la 4-an junio 1900

MATHIAS JOAQUIM DE GAMA E SILVA
Supera juĝisto en Gojaso, esperantistiĝis en la jaro 1898, varbita de Jácome Martins Baggi
de Araújo, forpasis la 14-an de aŭgusto 1905.

Eminentaj virinoj en la Brazila Esperanto-Movado

MARIA DAS DORES GÓES



Mattos de Oliveira.

Nuntempe Maria das Dores Góes prezidas EAB-n (Esperanto-Asocio de Brasília) kaj BK de BEL (Brazila Konsilantaro de Brazila Esperanto-Ligo) kaj instruas Esperanton en EAB kaj BSF (Brazila Spiritisma Federacio) kromekunlaboras ĉe Biblioteko Carlos Domingues (sekcio de BEL).

Ŝi naskiĝis en la urbo Florianópolis, ŝtato Santa Catarina, Brazilo, en la 24-a de januaro 1943. Profesie ŝi instruis en sia naskiĝurbo, Rio de Janeiro krome Brasília. En 1994 ŝi emeritiĝis kiel instruisto pri Historio.

Ŝi eklernis Esperanton en 1979 ĉe Brazila Spiritisma Federacio. Tiam ŝia instruisto estis Francisco

Das Dores ekinstruis bazan kurson ĉe EAB en 1991 kaj ĉe BSF en 1996. Ĉe BEL, ŝi oficis kiel kasisto dum tri estrar-periodoj. Ŝi estis kaj estas aliĝinta al UEA, BEL kaj ILEI. De kiam ŝi esperantistiĝis, rare ŝi malĉeestis la naciajn kongresojn. UK-ojn ŝi ceestis: Braziljo, Brazilo (1981); Havano, Kubo (1990); Fortalezo, Brazilo (2002).

En la 17-a de septembro 2000, okaze de la 3-a Esperanto-Renkontiĝo de Taquatinga, ŝi prelegis en portugala pri la temo: Ensino de Esperanto para crianças (instruado de Esperanto por infanoj).

Lernante, instruante, kongresante, laborante kaj kunlaborante (mone kaj mane), Das Dores iĝis eminenta virino de Brazila E-Movado. ★

Esperanto Post la Kulisoj

Perspektivoj pri la uzado de Esperanto en la branĉo de servoj kaj meditoj pri ĝia socifunkcia aspekto, pensitaj post la 47-a Brazila Kongreso de Esperanto, okazinta en Tagvatingo-DF

Osmar da Silva Alves

Antaŭ nelonge, la amaskomunikiloj disvastigis pri drono de itala krosŝipo, kiu mortigis dekojn da homoj. La ŝipo restis dum kelkaj tagoj sur la maro kaj la savantaroj laboradis por trovi novajn viktimojn. Situacioj kiel tia ankaŭ okazas en la aera spaco. Kelkfoje oni raportas akcidentojn okazigantajn plurajn mortojn, kiel tiun en la flughaveno Los Rodeos (nuntempa Tenerifo Norda), en la insulo Tenerifo, Hispanujo, la jaron 1977: la kolizio inter du aviadiloj sur la trako provokis 583 mortojn kaj lasis 61 vunditojn. Ĝis nun, ĝi estas konsiderata la plej grava akcidento en la tutmonda aviado.

Krom la mortoj, tiajn akcidentoj pritraktas ĉiutagan aferon, ofte malkonsideratan de la socio kaj kapablan malfermi vastan agadkampon por esperantistoj kaj studemuloj: la afero pri idiomo. Turismaj medioj ricevas milojn da pasaĝeroj el diversaj partoj de la planedo – fakto, kiu transformas la transportilojn en verajn “Babelturojn”. La menciita droninta ŝipo ekzemple transportis 4.200 pasaĝerojn kaj ŝipanojn.

Sekve, la savantaroj, krom okupiĝi pri siaj ĉefaj devoj, estas devigataj kunvivi kun lingvaj malfacilaĵoj. Rilate la krosŝipon, estis 40 malsamaj naciecoj kaj duono de la ŝipanoj, azidevena, apenaŭ parolanta la anglan, devis eĉ uzi signojn dum la komunikado kun la savantaroj, pasaĝeroj kaj cetero de la ŝipanoj.

En la tenerifa tragedio, antaŭ la ŝoko inter ambaŭ aviadiloj de la flugkompanioj Pan-Am (usona) kaj KLM (nederlanda), la kondiĉoj de la trako ne estis sufiĉe favoraj. Forta nebulo malfaciligis la lokiĝon de la flugveturiloj, ĉar tiam la flughaveno ne havis surfacajn radarojn. Tamen, pli gravaj estis la komunikaj malfacilaĵoj inter la pilotoj de ambaŭ aviadiloj kaj la hispana kontrolisto. Ili misinterpretis la avertajn mesaĝojn de la kontrolituro pri la liberigo de la trako por deteriĝo – fakto, kiu negative ŝanĝis la sorton de 644 homoj.

Laŭ la prezidanto de Afcan (Franca Ŝipkapitana Asocio), Jacques Loiseau, la diverseco de idiomoj estas determina faktoro en la gravaj momentoj dum savlaboroj. Nepras efika trejnado por superi tiun obstaklon, ĉar la paniko malhelpas la komunikiĝon. Oni devas ripeti multfoje la ordonojn al la pasaĝeroj kaj plejofte mankas al la ŝipanoj la kono pri vortoj necesaj en tiaj momentoj.

Dum la dialogoj inter kontrolisto kaj aviadilaj pilotoj, oni rimarkas la uzadon de neordina-
ra frazaro kompare kun tiu adoptata de ICAO (Internacia Civilaviada Organizo), kio provokas
konfuzan komprenon al la kontrolisto. Claude Piron, kompetenta profesia tradukisto, kiu,
dum plenumo de siaj aktivadoj eĉ loĝis kelkan periodon en Usono, konfesas, en unu el la
epizodoj de la serio “La lingvoj: unu defio”, ke se estus li la respondeca pri la transportado
de tiom da vivoj, li mem ne komprenus unuamomente la anglalingvan frazon “Clipper (nomo
de la aviadilo de Pan-Am) 1-7-3-6 report clear of runway (raportu la trakoliberigon)”, kaj pro
tio ne evitus la katastrofon.

Kent Jones, emerita civila inĝeniero, unuafoje konatiĝis al aviado dum la militista servo
en la usona mararmeo. Idealiganto de la vortaro kompilita de Gilbert Ledon, “Aviada Termi-
naro”, li avertas, ke tiel ICAO, kiel FAA (Federacia Aviadagentejo, usona registara organizo,
kiu superrigardas kaj reguligas la aertrafikon) senkritike akceptas variaĵon je 38 dialektoj de
la angla, krom sennombraj fremdaj akĉentoj, kiel Spanglish (la hispanangla) – ĉiuj ili eblaj
generantoj de konfuza komunikado inter gepilotoj.

Antaŭ la prezentitaj faktoj, endas starigi demandojn: Esperanto, kreita en 1887 kiel solvo
por internacia komunikado, estas disvastigata pere de plej diversaj periodaĵoj kaj instrume-
tadoj kiel lingvo por komunikiĝo kun homoj el la tuta mondo en la plej diversaj situacioj, per
korespondaĵoj, dum aviadila aŭ trajna vojaĝo, por iri al alia lando, dum gastado en hoteloj
ktp. Sed, nuntempe, kian lokon Esperanto okupas en tiuj medioj? Kiu estas la vera utileco de
ĉi tiu idiomo hodiaŭ?

Multaj povas elstarigi la gravecon de la lingvodisvastigo spite la kvanton da homoj, al kiu
oni konigas Esperanton. Konsidere al ĝiaj multaj kvalitoj, kiel simplan senesceptan gramati-
kon, klaran prononcon kaj alireblan vortaron, devenan de la plej pluraj idiomoj, kiom konsi-
ciaj estas la homoj laborantaj en flugkompanioj, ĉu aviadistoj, ĉu pasaĝeroj, ĉu funkciuloj de
hotelaj retoj kaj savantaroj, rilate la tutmondan lingvan problemon?

Oni memoru, ke la lingvoj nuntempe uzataj grandskale, kiel la angla, havanta la hegemo-
nion en informocirkuliĝo kaj konsiderata lingua franca (interlingvo) en rilatoj kun eksterlan-
daj parolantoj, ne posedas trajtojn adekvatajn por internacia komunikado. Kent Jones, en
artikolo rete publikigita, listigas minimume sep el ili, jene: unu litero por ĉiu sono; ununura
akcento por ĉiu vorto; pluraloj formataj sammaniere; neniu neregula verbo; ne pli ol kvin
vokalsonoj; vortoj kun ne dubasenca signifo; malgrandigita nombro da idiomaĵoj, slangaĵoj
kaj profesia ĵargono. La manko de unu el ili treege malfaciligas la perradian komunikadon in-
ter piloto kaj kontrolisto. Esperanto kontraŭe prezentas sennombrajn trajtojn, kiuj adekvate
kontentigas tiun interkomunikadon.

Ni memoru, ke ĝuste nun en la 21-a jarcento, kiam ni sukcesis atingi grandegan teknolo-
gian progreson rilate komunikilojn, kiuj malgrandigas distancojn tra la tuta globo, ankoraŭ
ekzistas baro malhelpanta la evoluadon de tiel baza rimedo: la lingvo. Danke al ĝi, la civita-
naroj ne havas alian rimedon, krom fermi sin ene de siaj lingvaj rondoj, multfoje konsiderataj
minoritataj antaŭ la hegemonia lingvo, aŭ submetiĝi al ĝia studado, eluzante valorajn

tempon kaj monon por akiri nesufiĉan rezulton dum la klopodo ĝin lerni. Iamaniere, per tio la lernanto kvazaŭ malrespektus sin mem. Ofte li klopodas lerni ĝin sen atingi ĝian plenan regadon, kaj konsideras sin nekapabla, kvankam la problemo ne kuŝas sur la lernanto, sed fakte sur la lingvo.

Situacioj kiel tia videblas en ĉiuj mondopartoj. Homoj mortas pro tio, ke ili ne sukcesas komunikiĝi kun siaj helpantoj! Tion konstatis Sylla Chaves, fervora disvastiganto de la Lingvo Internacia, kiu laboris inkluzive kiel tradukisto en la sidejo de Unuiĝintaj Nacioj. En unu el siaj artikoloj, Sylla raportas pri siaj problemoj dum li komunikis siajn simptomojn al kuracisto, kiam li malsaniĝis en Germanujo, en 1979. La kuracisto lin traktanta ne kapablis fari por li prognozon pere de anglalingva dialogo. Estis necese, ke Sylla parolu en la germana, je la baza nivelo, serĉante ankoraŭ helpo de hinda kuracisto por traduki la plej teknikan terminaron por ke li tiel ricevu prognozon.

La progreso dum Esperanto-lernado, tamen, fariĝas pli plezuriga. Roman Dobrzynski, en artikolo publikigita en la revuo Esperanto (UEA), Decembre 2006, priskribas sian sperton instrui kiel invitita profesoro en turisma fakultato lokita en Pekino dum tri monatoj. Fine de tiu periodo, unu el liaj studentinoj raportis sian sperton kun la nova lingvo, farante la jenan komparon: “Mi lernas dum ok jaroj la anglan lingvon kaj mi ne povas paroli. Mi lernas tri monatojn Esperanton kaj mi povas paroli”.

Kvankam la originoj de Esperanto devenas de la plej diversaj mondolingvoj, tamen la elektoj de la radikoj de ĝiaj vortoj fare de ĝia kreinto ne estis arbitraj. Claude Pirón, en sia verko “La Lingva Defio”, priskribas la klarecon de la Esperanta prononcado. En la orientaj lingvoj ekzistas fonetika problemo pri klareco dum malsamigo inter /l/ kaj /r/, fare de ĉinoj kaj japanoj. Sed en Esperanto, la anstataŭigo de unu fonemo per alia ne okazigas grandajn ŝanĝojn en ĝia signifo, kiel en la anglaj vortoj *right* kaj *light*. Tiuj vortoj povas okazigi miskomprenon se uzataj en esprimoj kiel *light thinking* (milda penso) kaj *right thinking* (ĝusta penso), en kiuj ĉinoj kaj japanoj bezonas uzi ekkonajn rimedojn por kodigi la ĝustan fonemon kaj deĉifri ĝian veran sencon.

En Esperanto oni evitas tiun malfacilaĵon, ĉar la vorto *right*, se uzata por esprimi “rekta”, tiel tradukiĝas. Se la traduko por *right* estas uzata en jura terminaro, la vorto estos “rajto”, sen konfuzo kun *light*, tradukita en Esperanton per “lumo”, ne per “lajto”. Eĉ la vorto “lumo” ne konfuziĝas kun “rumo”, kiel ajn akĉentitaj estas la prononcoj de unu el tiuj du fonemoj, ĉar la kuntekstoj en kiuj oni uzas ambaŭ vortojn ĝenerale estas tre malsamaj.

Sed tamen nepras destini la lingvaj kvalitojn de Esperanto en specifajn kampojn. Hodiaŭe, oni faras belan disvastigan laboron de la lingvo, kvankam malgrandskale, en kluboj kaj asocioj, interretaj paĝaroj kaj en aliaj lokoj ekster la Esperantaj rondoj, kiel la religiaj medioj, kiuj disvastigas siajn kredojn kaj doktrinojn uzante la lingvon de Zamenhof kiel laborlingvon. Krome, baldaŭ tiu, kiu kandidatigos por instrui Esperanton, estos favorata per la tiel nomata “leĝo Cristóvam”, kiu starigos la Lingvon Internacian kiel kroman instrufakon por la mezgranda instruado.

Por ke la mondo konu Esperanton kaj ties potencialojn, ni bezonas ampleksigi ties horizontojn por atingi profesiulojn en pluraj areoj. Krom la streĉo suferata dum plenumado de siaj aktivaĵoj, aviadistoj kaj ŝipanoj, hotelistoj, savantaroj, policistoj ktp. estas devigataj alfronti krizajn situaciojn, en kiuj komunikilo pli dinamika, kia estas Esperanto, povus malgravigi la problemojn kaj helpi en ties solvo, respektante la homon, ĉar, sendepende de la origino, la parolanto sukcesas komunikiĝi relative facile. Eĉ ĉinoj kaj japanoj, aŭ loĝantoj de iu ajn globoparto, lernas kaj komunikiĝas en Esperanto kun granda facileco, sen dialektoj aŭ prononcaj problemoj.

Ĝis nun ekzistas provoj por faciligi la uzadon de la hegemonia nuntempa lingvo, la angla. Notindas memori, ke la nuna teksto ne estas manifesto por atako kontraŭ la lingvo de Ŝekspiro, sed raciigo pri solvo de problemoj, kiu atingas tutmondajn proporciojn. La angla estas la nomata "monda lingvo" hodiaŭa, sed ĝi prenas sur sin tiun rolon provizore, ĉar aliaj lingvoj jam faris tion en la pasinteco, kaj la anglan ankaŭ anstataŭos alia hegemonia lingvo, se oni altrudos ĝin en la estonteco.

Unu el tiuj ekzemploj pri lingva transformiĝo estas la globiŝa (monda angla), kreita de la franco Jean-Paul Nerrière, kiu malgrandigas la leksikon de la angla ĝis 1.500 vortoj kaj kies gramatiko baziĝas sur tiu de la angla mem. Ĉar ĝia vortaro limiĝas al tiu kvanto, oni ne diras en la globiŝa, ekzemple, la vorton "nevo". Anstataŭe, oni uzas la esprimon "filo de mia frato". Claude Pirón kritikis la proponon de Nerrière, nomante ĝin masoĥismo. Vere la 1.500 vortoj de la globiŝa tradukiĝas pere de nur 1.300 Esperantaj vortoj plus 40 afiksoj (1.340 leksikeroj). La riĉeco de Esperanto montriĝas en tiu punkto, ĉar eblas formi el tiuj unuoj iom pli ol 13.000 vortojn treege utilajn en altnivelaj diskutadoj. Kompare kun la lingvo de Nerrière, oni havas 13.000 vortojn disponeblajn je iu ajn okazo! Kompreneble, Esperanto ege pli efikas!

Se paroli pri investoj, ni plu faru la kalkulojn: Esperanton oni povas lerni dum 60 ĝis 150 horoj, laŭ Pirón. Laŭ li, por ellerni la anglan, oni uzas 8.000 horojn aŭ pli. Ĝenerale, la ellernadon de Esperanto oni atingas post 500 ĝis 1.000 horoj, kompare kun la angla. En iuj okazoj, laŭ la talento de ĉiu homo, 300 horoj sufiĉas.

Rimarkindas do tio, ke la rilato kosto/profito de Esperanto estas minimume pli sencohava, ol la investo nuntempe farata por la lernado de la hegemonia lingvo. La profito el la lernado de Esperanto povus esti tre bone aplikata en la aktivadoj de ni cititaj, aŭ en iuj ajn aliaj, kies ĉiutago postulas lingvan kontakton. Jen la momento adekvata por ke la mondo, kaj ĉefe la geesperantistoj, pensu pri solvoj por disvastigado, prezentado kaj adoptado de tiu mirinda idiomo en tiuj medioj, celante uzi ĝin en la solvo de problemoj kaj helpo okaze de akcidentoj. Oni devas atribui al Esperanto la socifunkcian rolon por kiu ĝi estis kreita antaŭ 125 jaroj. Ĝustadire, jen la unua instigo de junulo, kiu volis krei lingvon por malgrandigi la miskomprenon inter la popoloj. Libro kiel "Aviada Terminaro", de Ledon, kaj "La Lingva Defio", de Pirón, estas veraj gvidiloj por la interesigantoj pri tiuj aferoj kaj dezirantoj studi en tiuj kampoj. La lingva solvo por ĉiuj popoloj jam ekzistas. Jen nia tasko adopti ĝin ekde nun! ★



KIU LI ESTAS?

Sur la kovrilo troviĝas la foto de elstara figuro de la brazila Esperanto-movado. Temas pri mistera kaj enigma esperantisto. Lia nomo estas Allan Kardec Afonso Costa, vortaristo, tradukisto, kiu naskiĝis en Uberaba, Minas Gerais, la 22-an de septembro 1914. Allan Kardec loĝis en la urbo Uberlândia, kie li laboris en librovendejo, instruis portugalan kaj lernis lingvojn. Poste li translokiĝis al Rio Verde, en Goiás, kie li laboris en komercejo kaj konis sian unuan edzinon. Per konkurso li fariĝis oficisto de Banco do Brasil (Banko de Brazilo), en 1941. Tiam, Allan Kardec translokiĝis al Belo Horizonte. En la ĉefurbo de Minas Gerais, li ekinstruis Esperanton ĉe União Espírita Mineira. Lia unua edzino forpasis, sed, en la jaro 1968, li edziĝis kun unu el siaj lernantinoj, fraŭlino Dalva Noronha. Ili havis tri gefilojn: Lísius, Dirce kaj Denise.

10

Post sia emeritiĝo, en 1969, li disponigis siajn fortojn al verkado de du gravaj vortaroj: “Novo Dicionário Português/Esperanto” kaj “Dicionário Completo Esperanto/Português”, eldonitaj de Brazila Spiritisma Federacio. Tiu tasko estis verŝajne lia plej grava kaj efika kontribuo al Esperanto.

Li tradukis en Esperanton la jenajn verkojn: “Malbona lupo reenkarniĝinta”, “Kristana agendo”, “Sur la vojo al la lumo”, “Verda signalo”. Krome, li tradukis la majestan verkon “La Ĉielo kaj Infero”, kune kun Benedicto Silva, kiu respondecis pri la neparaj ĉapitroj.

La libro “Antologio de brazilaj rakontoj”, eldonita de Brazila Esperanto-Ligo, en 1953, enhavas la rakonton “La aukciaĵo 587-a”, de Júlia Lopes de Almeida. Kiu esperantigis ĝin? Allan Kardec Afonso Costa. Nia kara samideano tradukis ankaŭ la rakonton “Um susto”, de Arthur Azevedo.

Okaze de la “Semana Esperantista de 1945, en Belo Horizonte, li rolis kune kun Olga Brandão Coutinho la skeĉon “La rido kaj la larmo”. Li ankaŭ prelegis en tiu evento pri la temo “O que é o Esperanto”.

La 1-an de januaro 1946, Allan Kardec enposteniĝis kiel unua sekretario de “Esperanto-Klubo Azeredo Coutinho”.



Allan Kardec kaj familianoj.

Allan Kardec estis membro de la Loka Kongresa Komitato de la 12-a Brazila Kongreso de Esperanto, okazinta en Belo Horizonte, de la 21-a ĝis la 24-a de septembro 1949.

Plurfoje li gastigis hejme eksterlandajn esperantistojn, interalie, Victor Sadler, aktiva direktoro de UEA dum pluraj jaroj.

Allan Kardec fondis, en la 3-a de oktobro 1980, "Livraria Espírita Emmanuel" (librovendejo), ĉe la Avenuo Contorno, n-ro 1286, en Belo Horizonte. En 1983 la librejo disvendis 1240 esperantajn librojn. Inter tiuj libroj, kelkaj ekzempleroj de PIV, Fundamenta Krestomatio, La Sankta Biblio.

Nia karega samideano estis redaktoro de la bultenoj "Esperanto Aldono", "Boletim de Esperanto" kaj de la revueto "Esperanto Triumfanta".

Allan Kardec Afonso Costa, 97-jara, sen ia dubo ludis gravan rolon en nia movado. Ni nur povas admiri kaj danki, ĉar li metis senhezite sian kapablecon je la dispono de Esperanto, en kies fina venko li firme kredas. Nia lingvo estis kaj estas por Allan Kardec serioza afero.

Li ankoraŭ vivas en la bela urbo Belo Horizonte. Vivu longe sur la Tero, karega samideano! ★

OKULFRAPA ESPERANTO-REKLAMO

Evandro de Freitas

Antaŭ kelke da tempo kiam mi promenante en mia urbo Valença-RJ kaj vidante plurajn reklamojn de komercaj entreprenoj stampitajn sur muroj kaj tabuloj (en permesataj lokoj, kompreneble!), venis al mi la ideo fari la samon por Esperanto.

Komence mi pensis okazigi ĝin en tre konata spŝrta klubo, en kiu jam estas pluraj anoncoj videblaj sur propraj murpaneloj.

Fine de la dua dekkvintagaro de la marta monato, mi decidis efektivigi la ideon!

Mi kreis modelon de la diskonigota bildo kaj transdonis ĝin al literisto (literpentristo). Sufiĉe preta! La unuan semajnon de aprilo, E-bildo alta je 2,50 metroj montriĝas al centoj da personoj, kiuj ofte iras al la klubo. Kaj tio dauros dum la tuta jaro ĝis aprilo 2013, laŭ kontrakto interkonsentita inter mi kaj la klubo. Ĉi-kaze la lu-kosto estis proksimume R\$100,00 jare kaj pagata per pilkoj piedpilka, korbopilka kaj retpilka! ĵŝ

Efektiviginte tiun etan laboron, mi volis daŭrigi ĝin pensante ĉi-foje atingi pli grandan publikon. Inter la koncernaj lokoj en mia urbo estas privata lernejo, urbocentre lokita, kiu rezervas la eksteran parton de unu el siaj muroj por reklamo, ĉi-kaze kontraŭ monata luo de R\$30,00 popanele. Sur tiu ĉi muro estas 25 disponeblaj paneloj pli grandaj ol tiuj de la klubo!

Kvankam mi jam decidis efektivigi tiun ĉi proksiman taskon, eĉ pli kostan, mi preferis peti monhelpon al tri esperantaj amikoj en mia urbo por malpliigi miajn elspezojn.

Tu je ili akceptis la proponon jam koninte la laboron en la klubo.

Do dum la sama kuranta aprilo pretiĝis la dua panelo por E-reklamo! Per ĉi-lastaj miloj da personoj de Valença-RJ kaj aliaj urboj okulfrape vidos bildon diskonigantan Esperanton ĉiujare!

Per tiu ĉi artikolo mi celas ne nur informi pri modesta kampanjo, sed ankaŭ inviti nia-

jn brazilajn samideanojn uzi tiun rimedon por E-diskonigo. Ĝenerale urboj havas specifajn lokojn tiucele. Tia maniero reklami Esperanton estas simpla, rapida, daŭra, kaj, krom tio, nealkosta ĉefe agante grupe.

Mi dankas pro ĉies kunlaboro kaj al redaktoroj pro speciala paĝa loko en BRAZILA ESPERANTISTO!

Brakumojn kaj sukceson al ĉiu! ★



DEZIRAS KORESPONDI

La samideano Pavel Štastný deziras korespondi kun brazilanoj pri variaj temoj sendepende de aĝo, de sekso, de klereco kaj de religio. Li ŝatas interŝangi poŝtmarkojn kaj bildkartojn. Adreso: U Děkanky 1648/12, 140 00 Praha 4, Ĉeĥa Respubliko.

JOSÉ SARAIVA MATOS



BE- Kiu estas José Saraiva Matos?

Mi estas 94-jara esperantisto kaj tutmonda civitano. Mi naskiĝis la 10-an de julio 1918, en Guaraciaba do Norte, ŝtato Ceará, Brazilo. Profesie, mi emeritiĝis kiel suboficiro de Brazila Aerarmeo. Kiel poeto, mi estas membro de la Grupo de Kultura Agado de Bahia (Grupo de Ação Cultural da Bahia) kaj ties oficiala organo "Caderno de literatura" (Literatura kajero) publikigis kelkajn poemojn verkitaĵojn de mi.

BE- Kiel vi esperantistiĝis?

Post kiam mi konis Bahia Esperanto-Asocion. Tie mi esperantistiĝis.

BE- Kiel vi movadumas?

Mi intense aktivas en la nordorienta esperanto-movado, ĉefe en Bahia. Mi kaj mia edzino partoprenis plurajn naciajn kongresojn de Esperanto, inkluzive en la lasta, okazinta en Taguatinga, Federacia

Distrikto, en januaro 2012. Mi gvidis la Studgrupon Zamenhof, en Salvador, dum 15 jaroj. Mi aktivis ankaŭ en Bahia Esperanto-Asocio ekde 1972, lernante kaj instruante Esperanton. La 5-an de julio 1983, mi kunfondis Sociedade Esperantista de Salvador, kiu havis gravan rolon en nia loka movado.

Sur landa nivelo mi estis vicprezidanto de Brazila Konsilantaro de Esperanto. Nuntempe mi estas membro de ABE, BEL, UEA kaj GAC-BA.

Mi verkis poemojn, dulingvajn kriptogramojn (esperante kaj portugale), kaj kompilis du didaktikajn librojn (Baza Praktika Kurso de Esperanto kaj Elementa kurso de Esperanto).

Mi esperantigis diversajn kanzonojn, interalie, "Mi volis nur lerni Esperanton", "Omaĝe al Esperanto", "La saŭdado nin mortigas", "Palmarbo de Itapoan", "Multa Lumo", "La sonĝo", "Bela Maria".

BE- Kion pli tuŝas vin en la Esperanto-movado?

Ĉion, kion rilatas al Esperanto mi multe admiras, ĉefe la kreinto de la lingvo, D-ro Lazaro Ludoviko Zamenhof.

BE- Kion plorigas vin en nia movado?

Ĉefe la fakto, ke esperantistoj ne kutimas viziti avenuojn, placojn kaj stratojn kiuj nomiĝas Esperanto aŭ Zamenhof, malgraŭ la disvastigado de la aferon inter la esperantistoj, sed la plimulto el ili ne atentis pri tio.

BE- Ĉu vi revas pri Esperanto? Kion vi revas?

Mi revas, ke Esperanto estu pli bone disvastigata kaj uzata en la tuta mondo.

BE- Ĉu vi volas fari aliajn klarigojn?

Mi deziras, ke havu unuecon, malgraŭ la diverseco. ★

La Rozoj¹

Júlia Lopes de Almeida

Tradukis Francisco Stefano Wechsler

Mia ĝardenisto estis viro fiaspekta, tutkorpe kovrita de hirta hararo, kun ruĝa haŭto kaj rigardo nefidema kaj malgaja.

Ĉiuj diradis al mi:

— Gardu vin, ĉar tiu ulo kompromitas vian hejmon! forpelu lin!...

Sed, ĉar li estis silentema, enmemiĝinta, kaj precipe ĉar li tre kompetente prizorgis miajn florojn, mi ŝultrolevis:

— Ne troigu! Kompatinda! Pri tiuj manieroj de sovaĝa besto certe li ne kulpas!

Kaj tiele ni plu vivadis.

Unu vesperiĝon, Septembre, mi subiris al la ĝardeno. Kia krepusko okazadis! En la ĉielo, ĉarpiiĝinta al nuboj, luno falĉilforma jam brilis, kaj tiel dolĉe, ke ĝi dezirigis al homoj nenion fari krom rigardadi ĝin! Ankaŭ vidiĝis, en la aero trarvidebla kaj kvieta, tia delikateco de koloroj, ke mia animo ŝvebus en ĝi ekstaze, se miaj okuloj, ĉion trarigardante, ne tuj ekvidus la nenombreblajn rozojn promesatajn de miaj rozujoj.

— Kiom da burĝonoj, Ĉiela Patrino²!

— Ĉio ĉi ekfloros ĉi-nokte — grumblis la ĝardenisto... — Morgaŭ estos centoj da rozoj en la ĝardeno!

Mia fantazio senbridiĝis. Centoj da freŝaj rozoj, ĉiuj malfermitaj, certe liverus novan gracion al tiu loko, kie maloftis tia abundo da floroj.

Mi mem dezirus rikolti ilin ankoraŭ freŝe roskovritaj: mi sendus bukedon al mia patrino, per rozoj kovrus la tombon de mia filino, per rozoj plenigus mian domon...

Kaj, uzante komandan kaj severan esprimon, neordinaran ĉe mi, mi diris al la harplena ĝardenisto, ke li tuŝu neniun floron! Ja mi sola rikoltos ĉiujn!

Li klinis sin obee.

Tiun vesperon mi frue enlitiĝis, preparante min por vekiĝi frumatene la sekvan tagon. Kaj tiel firme mi decidis, ke baldaŭ kaptis min dolĉa kaj trankvila dor-

mo.

Estis la sesa, kaj mi jam estis en la ĝardeno. Kvazaŭ vekiĝinta el sonĝo, konfuzita, mi ĉirkaŭrigardis kaj nur foliojn vidis... foliojn kaj pli da verdaj folioj! eĉ ne unu floron!

Mi krialvokis la ĝardeniston, kaj li venis, kvazaŭ magie, post momento, sed kun tia aspekto kaj tiel afliktata mieno, ke mi ektimis.

Liaj okuloj, pro sia ruĝeco, estis pura sango; la malglata barbo, longa kaj ruĝa, estis taŭzita kvazaŭ de vento el frenezo, kaj sur la dikaj kaj nigriĝintaj brakoj montriĝis profundaj sulkoj de ungoj...

— Miaj rozoj?! — mi demandis lin, maskante la teruron, kiun lia stranga figuro inspiris al mi.

— Ili estas ĉi tie! — li diris basvoĉe; kaj iris al sia ĉambro.

Mi sekvis lin, mirege, apenaŭ tenante la randon de la robo, por ke ĝi ne malsekiĝu pro la herbo, — kolerplena kaj samtempe scivola.

La ĝardenista ĉambro situis malantaŭe, inter la legomejo kaj la ĝardeno, apud du limeduroj agrablodoraj. Ombrante la pordon, staris pasiflora spaliro, kaj, ĉe angulo, apogitaj sur muro, troviĝis la ĝardeniloj.

— Kion li volas? — mi demandadis min mem. Subite, mi haltis:

— Mi ne eniros — mi respondis al gesto de li farata.

— Do, rigardu de tie! — la viro krude rebatis, malfermegante la pordon.

Mi apogis min sur la pordokadron por ne fali. Meze de la ĉambro, sub rozlavango, duonvidiĝis virina korpo.

— Ŝi estis mia filino — diris la ĝardenisto, inter singultoj pli similaj al hurloj ol al homa voĉo; — Ĉi-vespere, ŝi frapis la ĝardenpordon, multe plorante... ĉar ŝia konkubo batis ŝin... Ĉu vi klare aŭdis, sinjorino?! Mi penis ĵurigi ŝin, ke de nun ŝi ignoros tiun banditon, por vivi nur sub miaj karesoj... nur sub miaj karesoj!... Mi intencis dorloti ŝin ĉiel, kvazaŭ infaneton... Mi faris mil promesojn, genue, larme... Ĉu vi scias, kion ŝi respondis al ĉio ĉi?! Ke ŝi ankoraŭ amas lin!

Blinda pro furiozo, mi mortigis ŝin; ha! mi mortigis kaj ne pentas... Preferinde mortigita de honesta patro ol batata de iu ajn kanajlo... Post ŝia morto... mi trovis ŝin belega, belega! sed, kompatinda! ŝi alvenis mizere vestita, preskaŭ nuda... mi ŝin ekkompatis, kaj por venigi ŝin belaspekta al Nia Sinjorino³, mi vestis ŝin per rozoj!... ★

¹ Ĉerpita el la rakontvolumo *Ânsia eterna*, 2-a eldono, Eldonejo S. A. A Noite, Rio (1940?), 267 p.

² Unu el la nomoj uzataj de katolikoj por la Virgulino Mario, patrino de Jesuo.

³ Alia nomo uzata por la Virgulino Mario.

Brazila Kroniko

BEL-Estrararo

Kio okazas en via Regiono? CENTJARIĜO ĈE SBF



La 20-an de majo ĉijare okazis en la sidejo de Spiritisma Brazila Federacio simpla, tamen grava omaĝo por la Esperanto movado, nome **Centjariĝo de la Esperanta-kurso ĉe SBF**. Ĉeestis la okazaĵon reprezentantoj de pluraj asocioj kie estas esperantaj kursoj. En tre harmonia etoso S-ro Nestor João Masotti, prezidanto de SBF, salutis ĉiujn per agrablaj vortoj. Prof-ro José Passini bone kaj klare prelegis pri la ĉeftemo. Artaj prezentadoj ankaŭ ĝojigis la ĉeestantaron. Supre surfote oni vidas maldekstre dekstren S-roj José Passini – eksprezidanto de Brazila Esperanto-ligo (BEL), Affonso Soares – direktoro de Propagando de Esperanto ĉe SBF, Nestor Masotti, jam menciita, D-ro Lício de Almeida Castro – prezidanto de BEL, kaj Waldir Silvestre – prezidanto de Brazila Asocio de Esperantistoj Spiritistoj.

1-a CENTROKcidenta RENKONTIĜO DE ESPERANTO

Okazos en la urbo Catalão, ŝtato Gojaso, la **1-a Centrokcidenta Renkontiĝo de Esperanto**. Tiu grava evento por la esperanto-movado de la centrokcidenta regiono

(kaj ankaŭ por brazila e-movado) okazos de la 6-a ĝis la 8-a de Julio venontmonate kaj ĝi jam havas la ĉeftemo, kiu estas **Esperanto-movado en la Centrokcidenta Regiono**.

En la 1-a CORE la partoprenontoj ĝuos alkvalitajn prelegojn farotajn de estimataj samideanoj kaj samideaninoj, kaj ankaŭ muzikajn prezentadojn.

Agendu en via esperantaj eventoj vian ĉeeston en tiu neperdebla okazaĵo.

HUNGARA ESPERANTISTO VIZITIS BEL-on

S-ro Szabadi Tibor, naskiĝis en 1952 en la urbo Nagykanizsa, Hungario.

Li estas aktiva hungara esperantisto kiu sin dediĉas precipe al traduklaboro kaj al Filozofio en kiu kampo li jam aperigis eldonitajn plurajn librojn, inter ili “Zsarnok Banderas” (Tirano Banderas), krom la faman verkon de Ivone A. Pereira “Egy ongyilkos emlékei” (Memoraĵoj de Sinmortiĝintoj).

Dum lia trapaso por Brazilja li gastigis ĉe lia amiko Aymore kaj vizitis BEL-on, kie li estis ricevita de D-ro Lício de Almeida Castro, Prezidanto, D-ro Euripedes Alves Barbosa, Vic-Prezidanto kaj de aliaj BEL-estranaroj kaj BEL-kunlaborantoj.

Li estas klera homo kaj lia ĉeesto inter ni estis plezuriga kaj profitdona.

Ni dankas al Esperanto – Esperanto **BE** disemas amikecon tra la mondo. ★



WILSON VEADO (1918/2010) naskiĝis la 11-an de novembro 1918 en Entre Rios de Minas kaj forpasis la 17-an de majo 2010 en Belo Horizonte, Minas Gerais. Li estis filo de Pedro Ad-Víncula Veado e de Perina Corsine Veado, kaj edziĝis al Luísa Ventura Veado, kiu forpasis en 1993. Ili havis tri gefilojn: Ricardo Wagner Ad-víncula Veado, Carlos Weber Ad-Víncula Veado kaj Maria Luiza Ventura Veado.



Wilson Veado estis juĝisto, ĵurnalisto, radiisto, verkisto, profesia desegnisto kaj eminenta esperantisto. Li esperantistiĝis en 1933 kaj intense agadis en nia movado, ekzemple, estis delegito de UEA en Belo Horizonte, kunfondinto de Esperanto - Klubo Azeredo Coutinho (en 1945), unua sekretario de Montara Esperanto-Klubo (en 1941), instruis Esperanton ĉe Instituto Sankta Rafaelo (edukejo por blinduloj), redaktoro de Montara Bulteno, oficiala organo de Esperanto-Klubo Azeredo Coutinho, reprezentanto en Brazilo de Tutmonda Esperanta Ĵurnalista Asocio (membro n-ro 47-a), ĝenerala sekretario de la Loka Komitato Organizo de la XII-a Brazila Kongreso de Esperanto (Belo Horizonte, 1949).

Wilson estis talenta oratoro kaj prelegis okaze de pluraj Esperanto-aranĝoj. Li fondis la Fakultaton pri Filozofio, Sciencoj kaj Beletroj en la urbo Sete Lagoas, en la ŝtato Minas Gerais, kaj estis direktoro de tiu institucio dum pluraj jaroj. Li instruis Esperanton en tiu Fakultato.

La revuo Brazila Esperantisto, aprilo-junio 1949, publikigis la jenon pri nia neforgesebla samideano:

“Ĝenerala Sekretario de la O.K. de la 12-a Brazila Kongreso de Esperanto, juristo kaj ĵurnalisto, kreinto de la radio-programo <Brazila Kroniko> per PRI-3. Delegito de UEA kaj BLE, unu el la plej inteligentaj kaj agemaj samideanoj de la juna generacio de brazilaj esperantistoj. Li estas nun 28-jara”.

Multe pli estos direnda pri la aktivado de Wilson en nia movado. Dum sia esperantista vivo, li agadis mulflanke.

MARIA NISE STUDART LINS ALBUQUERQUE (1932/2010), edzino de José Lins de Albuquerque kaj patrino de Hermano Studart Lins de Albuquerque, forpasis la 16-an de majo 2010, en Brasília, laŭ nekrologo aperinta en la gazeto “Correio Braziliense”.

Ŝia edzo estis senatano, prezidanto de Brazila Esperanto-Ligo kaj prezidanto de la Organiza Komitato de la 66-a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Brasília, en la jaro 1981.

Hermano estis prezidanto de Esperanto-Asocio de Brasília, de 1990 ĝis 1994.

Kiel membro de la Organiza Komitato de la 66-a UK, Maria Nise okupiĝis pri artaj aranĝoj.

Ŝi naskiĝis la 11-an de januaro 1932, lernis Esperanton en Fortaleza, Ceará, kaj estis membro de BEL kaj UEA. ★

Financa Raporto

LIGA BRASILEIRA DE ESPERANTO


CNPJ 00.406.504/0001-06

DEMONSTRAÇÃO DO RESULTADO DO EXERCÍCIO EM 31 DE DEZEMBRO

RECEITAS	Ano 2011	Ano 2010
<u>Receitas de Custeio</u>		
Anuidades Sociais.....	40.804,00	41.177,21
Receitas de Congresso.....	0,00 (a)	6.056,86
Donativos diversos.....	15.716,00	11.652,41
<u>Receitas de Vendas</u>		
Vendas do "Libroervo".....	47.075,54	32.969,92
<u>Receitas Financeiras</u>		
Rendimento de aplicações financeiras.....	695,49	975,50
<u>Outras Receitas Eventuais</u>		
Comissão sobre assinatura de periódicos.....	0,00	15,20
Aluguel de sala.....	6.701,84	8.882,29
Despesas recuperadas e Receitas diversas.....	420,22	0,00
TOTAL DAS RECEITAS	111.413,09	101.729,39
<u>DESPESAS</u>		
<u>Despesas Administrativas</u>		
Manutenção e reparos.....	12.507,83	6.246,02
Conservação e limpeza.....	1.820,09	373,10
Energia elétrica.....	1.550,34	2.039,92
Material de consumo/expediente/pouca duração.....	671,90	1.450,00
Seguros.....	1.546,31	1.936,17
Impressos.....	12.160,00 (b)	1.490,00
Serviços contábeis.....	13.760,00	15.803,00
Correios.....	7.259,53	4.847,19
Viagens e estadias.....	2.400,00 (c)	7.435,00
Taxas e anuidades.....	23.281,55 (d)	16.143,36
Telefone.....	2.549,17	2.720,38
Fretes e carretos.....	361,28	462,70
Lanches e refeições.....	0,00	72,00
Biblioteca da Liga/Despesas com Edição de Livros.....	0,00	1.174,90
Divulgação e propaganda.....	465,00	0,00
Doações.....	149,75 (e)	0,00
Serviços terceiros PF.....	710,00	0,00
Despesas diversas.....	2.338,00 (f)	0,00
Depreciações.....	0,00	5.455,89
Despesas com pessoal.....	35.945,30	40.034,30
<u>Custo de Mercadorias Vendidas</u>		
Valor apurado no período.....	16.971,40	29.916,82
<u>Impostos, Taxas e Despesas Financeiras</u>		
Imposto predial territorial urbano - IPTU/TLP.....	4.449,70	3.657,19
Contribuição Sindical.....	142,22	132,93
PIS sobre folha de pagamento de pessoal.....	279,83	220,98
Comissões e despesas bancárias.....	(2.782,24) (g)	6.180,98
Deficit do exercício.....	(27.123,87)	(25.818,44)
TOTAL DAS DESPESAS	111.413,09	121.978,39


Brasília, 9 de abril de 2012


Contabilizadora Ass. Tec. Ltda.
CRC-DF 06240


Lício de Almeida Castro
Presidente

Notas explicativas e parecer do Conselho Fiscal no verso

LA REVO DE ALBERTO FLORES KONKRETIĜIS



**Neforgeseblaj
skribaĵoj de
Ismael Gomes Braga**

Euripedes Alves Barbosa
Aymore Vaz Pinto
Sandro Moreira Alves

Remetente:
Liga Brasileira de Esperanto
SDS Ed Venancio III - sala 303
70393-902 Brasília-DF

En la revuo Reformador, Alberto esprimis per intuiciaj vortoj, ke li volas vidi la artikolojn de IGB, dormantajn ene de bibliotekoj, denove disponeblaj al la esperantistaro. Kelkan tempon poste, Brazila Esperanto-Ligo eldonis la verkon "NEFORGESEBLAJ SKRIBAĴOJ DE ISMAEL GOMES BRAGA", konsistanta el aro da artikoloj, leteroj kaj recenzoj, kiu jam estas disponebla al la esperantistoj, en la Libroservo de BEL.